SEK-Bulteno

Informilo de Saenzpenja Esperanto-Klubo
Eldonita ekde novembro 1990 en hispana kaj Esperanta lingvoj.
Diskonigas pri la Internacia Lingvo Esperanto kaj pri ĝeneralaj regionaj novaĵoj.

N° 36 **julio-septembro** **2012 [3]**



Buenos Aires será sede del Congreso Mundial de Esperanto en 2014

Bonaero 2014

Sidejo de la
99-a Universala Kongreso de Esperanto

Vidu paĝojn 5 kaj 10-11

SEK-Bulteno

N° 36 Julio-Septiembre 2012 [3]
Boletín informativo del
Club Saenzpeñense de Esperanto.
Fundado en noviembre de 1990 por
Rubén T. Diaconu Tkachenco

Distribución
SEK-Bulteno se edita y difunde con la colaboración voluntaria de los miembros y simpatizantes de SEK y su distribución es gratuita.
Se envía a más de 600 direcciones de correo electrónico de esperantistas y simpatizantes en más de 32 países.
También puede ser leído y/o "bajado" de: **www.gazetejo.org**

Redacción
Calles 119 y 122
H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña
Chaco, Argentina
E-mail:
rubendiaconu@yahoo.com.ar

Saenzpenja Esperanto-Klubo

Redacción general
Rubén Teofil Diaconu Tkachenco
Miembro y Delegado local de UEA
(*Universala Esperanto-Asocio)* Holanda

Colaboradores
Emmanuel Maggiori (Buenos Aires)
Ernesto R. Moreira Martin (Córdoba)
Carlos Devizia (Buenos Aires)

El contenido de *SEK-Bulteno* no necesariamente representa la posición ni la opinión de SEK y/o la Redacción.
Son responsables
quienes subscriben los mismos.



Amigos lectores:

Con un inmenso caudal de información estamos presentando SEK-Bulteno N° 36, en el mes del ***125° Aniversario del Idioma Internacional Esperanto.***
Los temas más sobresalientes son, sin lugar a dudas, el Congreso Mundial de Esperanto en Hanói, Vietnam, realizado este año… y el congreso a realizarse en Buenos Aires en el 2014.
Sin embargo, estamos seguros que el variado material que acompaña la presente edición será del agrado de todos Uds. y si consideran que en algo podemos mejorar háganoslo saber a la Redacción.
¡Que disfruten de la lectura!

La Redacción



Congreso Argentino de Esperanto 2012

La Liga Argentina de Esperanto anuncia el 54° Congreso Argentino de Esperanto a realizarse del **06 al 07 de octubre de 2012** en Buenos Aires. Dicho congreso, de alcance nacional, tiene como temas:
El esperanto como puente a la paz, la amistad y el desarrollo. Integración regional: turismo y economía.



Se ha aceptado la invitación de la Asociación Buenos Aires de Esperanto como entidad organizadora.

Durante el Congreso tendrá lugar la Asamblea Anual de AEL 2012,

Valor de la adhesión al Congreso:
$ 120 para quienes abonen antes del 23 de Agosto 2012.
$ 150 para quienes abonen posteriormente a esa fecha.

Inscripción:
https://eventioz.com/events/congreso-argentino-de-esperanto-octubre-2012
Para información de formas de pago:
sekretario@esperanto.org.ar

Fondo de reserva: se establece un fondo de reserva para cubrir gastos de participantes que no puedan abonar dicha suma o el transporte desde el interior del país. Quienes deban viajar desde el interior y no se hallen en condiciones de abonar su pasaje pueden solicitar ayuda de dicho fondo, total o parcial, según la disponibilidad.

Se invita a todos los que deseen proponerse como disertantes, realizar un evento o colaborar en otras propuestas se comuniquen por mail a
sekretario@esperanto.org.ar
o telefónicamente al (011) 15 5061 0596 (antes del 11 de agosto).

Argentina Esperanto-Ligo anoncas la okazigon de la 54-a Argentina Kongreso de Esperanto de **la 6-a ĝis la 7-a de oktobro 2012** en Bonaero, Argentino.
Kongrestemoj:
Esperanto kiel ponto al la paco, amikeco kaj evoluigo. Regiona integriĝo: turismo kaj ekonomio.

Bonaera Esperanto Asocio estis akceptita kiel organizanta grupo.

Kadre de la Kongreso AEL okazigos sian Jaran Asembleon 2012

Aliĝkotizoj:
$AR 120 por aliĝoj antaŭ la 23-a de aŭgusto
$AR 150 por aliĝoj post la 23-a de aŭgusto

Aliĝoj:
https://eventioz.com/events/congreso-argentino-de-esperanto-octubre-2012
Kiel pagi? Peti informojn al:
sekretario@esperanto.org.ar

Helpa fonduso: estas planata la starigo de helpa fonduso por subvencii laŭbezone tute aŭ parte la vojaĝ- kaj restadkostojn en Bonaero de tiuj enlandaj partoprenontoj, kiuj nepovante pagi siajn vojaĝbiletojn aŭ gastiĝkoston, sufiĉe frue antaŭanoncu sian intencon partopreni kaj petu helpon, ĉiam laŭ la efektive disponebla mono. Por gastigi ilin en Bonaero la organiza komitato klopodos trovi adekvatan malmultekostan loĝejon, aŭ eĉ, seeble, senpagan loĝejon.
Ĉiuj kiuj volas prelegi, proponi programerojn aŭ iel kunlabori estas petataj kontakti nin kiel eble plej frue retpoŝte al
sekretario@esperanto.org.ar
aŭ telefone al (011) 15 5061 0596.

Jorge Enrique Cabrera

Argentinos participaron del examen internacional de Esperanto



Alumnos durante el curso en la sede de Bonaera E-Asocio

El 09 de junio de 2012 se realizó el Examen Mundial de Esperanto. En total, 360 alumnos de 29 ciudades en 17 países han participado de esta 27ª Sesión de Exámenes de UEA.

El evento fue organizado y dirigido por Katalin Kovats, utilizando para ello todas las opciones y utilidades del sitio ***edukado.net*** y otros medios.

En nuestro país, 13 alumnos han participado dando los exámenes correspondientes en los niveles A2, B1, B2, y C1, según el **Marco de Referencia Europeo de Enseñanza de Lenguas**.

La preparación para el curso y el examen se realizaron en la sede de la Asociación Buenos Aires de Esperanto de la calle Paraguay Nº 2357 y tuvieron la valiosa participación de la Prof. Petra Smidelius.

http://www.retkompaso.com.ar/
http://www.edukado.net/ekzamenoj/ker
www.edukado.net/ekzamenoj/ker/statistiko

Congreso de Esperanto en Argentina

Buenos Aires: sede del 99º Congreso Mundial de Esperanto

Una expectativa y un anhelo de muchos años se harán realidad. Por primera vez un Congreso Mundial de Esperanto en Argentina.

En el 2011, la Liga Argentina de Esperanto, con ayuda del Instituto Nacional de Promoción Turística (IMPROTUR) ha realizado gestiones para que autoridades de la Asociación Universal de Esperanto realice una visita de inspección a las tres ciudades candidatas que se postularon: Buenos Aires, Mar del Plata, y Rosario.



Avenida 9 de Julio, Buenos Aires

El 8 de junio se emitió el comunicado oficial *"Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro 456"* mediante el cual *Universala Esperanto-Asocio* anunció oficialmente que UEA eligió a Buenos Aires como sede del **99º Congreso Mundial de Esperanto a realizarse en el año 2014.**

Será la primera vez que nuestro país reciba al evento más importante del mundo celebrado en lengua esperanto.



Silvia Rottenberg en la oficina de Improtur
http://www.retkompaso.com.ar/

Mi experiencia con esperanto en EE.UU.

Según el relato de dos esperantistas argentinas, madre e hija, que participaron en el curso de NASK desarrollado en Dallas, EE.UU., del 25 de junio al 04 de julio de 2012.



Mabel Ojeda y Agustina Passavanti

NASK significa **Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto** (*Cursos de Verano de Norte América).* Estos cursos de idioma esperanto se realizan cada año durante las vacaciones de verano, (junio), aprovechando las instalaciones educativas que están sin uso temporario. En Argentina aun no hay esa posibilidad.

La Presidenta de *Argentina E-Ligo*, Sra. Silvia Rottenberg, me informó que ella había participado de NASK en San Francisco, hace algunos años. Luego me recomendaron contactar a Eddy Ellen que es la organizadora, "el alma matter" de NASK.

Sitios de NASK:

http://esperanto.org/nask/venonta/

http://www.facebook.com/nask.esperanto

Cada año se convoca a quienes deseen participar. El curso incluye alojamiento durante los 9 días, desayuno, almuerzo, cena, el curso y 2 excursiones a la ciudad, también incluye el derecho a las recreaciones, el libre uso de los lavaderos, piscina, internet libre (sin pago extra y con buena señal). Todo eso por supuesto tiene un costo. Pero yo solicité una beca para mi hija Agustina y para mi, considerando que como no vivimos en Estados Unidos y desde Argentina los pasajes son más caros que si fuéramos "locales". Así fue como me extendieron una (1) subvención para las dos, -es decir pagamos la mitad cada una con todo incluido-.

Fue la primera vez que NASK se realizó en una universidad de Dallas (Texas), el año anterior fue en San Diego, y los anteriores en San Francisco. El año próximo será en Carolina del Norte.

Es conveniente solicitar el curso y la beca a principio de año (enero), para organizarlo bien.

Cuatro días antes de nuestro curso, en la misma universidad tuvo lugar el Congreso Nacional de Esperanto al que no pudimos asistir pero según me comentaron fue muy exitoso.

No viajamos directamente desde Buenos Aires a Dallas, antes hicimos una escala en New York, y nos quedamos cuatro días para conocer algo de la “gran manzana”.

Llegamos a Dallas el domingo a la noche, estaba previsto llegar a la tarde, pero por alerta meteorológica se demoraron los vuelos

en el aeropuerto de La Guardia (New York). En Manhatan - pleno verano- hacia mucho calor. Pero al llegar a Dallas, ni bien salimos del aeropuerto a las 23:00 el cambio fue brusco, fue como entrar en un horno, pero agradable (clima seco).

Llegamos a la Universidad muy tarde y parecía un lugar inhabitado. Iluminado, pero reinaba un silencio imponente. Nos registramos, nos entregaron las dos llaves a cada una, que eran: una tarjeta magnética que abría todas las puertas que debíamos pasar y otra era una llave clásica pequeña de metal que abría sólo la habitación.

No puedo precisar las dimensiones del Campus, (predio universitario), pero sin lugar a dudas se trata de mucho espacio. Estábamos en un "building" que al igual que todos constaba de 4 pisos, en cuya planta baja esta el from desk, los lavaderos, una cocina para preparar algo de comer, que no era necesario usar, también había mesa de pool, metegol, mesa de ping pong, pantallas de TV, sofás para descansar, etc.

Según mis cálculos éramos 33 personas (entre alumnos, profesores y organizadores). Estábamos instalados en el 4° piso todos los integrantes del NASK (profesores y alumnos). Nos entregaron un juego de sábanas, toallas y almohadas y nos instalamos en una habitación que era como un pequeño departamento, donde se compartía baño, lavabo (lavadero) y ducha, pero cada cama estaba en cuarto individual, con buena iluminación y amplio *placard*, estantes y un escritorio con silla. Todo era muy confortable y con mucha privacidad. A la mañana siguiente hubo una reunión de apertura, en un salón grande en donde estábamos todos los alumnos. Éramos de todas las edades: los muy jóvenes de 14 años en adelante y los "jóvenes de espíritu que peinan canas" y muy joviales. Se presentaron los profesores uno por uno y contaron algo de si y nos dieron la bienvenida, pero de manera muy cálida y con humor.

Luego nos agruparon según los 3 niveles de los cursos: *Post-Baza*, *Meza* y *Supra* (Básico, Medio y Superior) Agustina y yo cursamos el nivel Medio. Fue muy beneficioso el examen que realizamos una semana antes con Petra Smideliusz en la sede de la Asociación de Buenos Aires de Esperanto.

Las clases en NASK fueron muy amenas. Comenzaban a las 8:45 hasta las 12:15 con un intervalo de 15 minutos en el medio. Tim Westover, nuestro profesor nos ubicó de manera de no estar en la clásica posición de profesor frente a los alumnos sino como una charla de amigos alrededor de la mesa. Nos repartía fotocopias, que leíamos todos un poco cada párrafo y surgían preguntas que se respondían luego de leído el texto. Muchos estaban provistos de iPad (¡menos no-sotras!), y eso hacia que inmediatamente surgía la respuesta y se charlaba entre todos acerca del uso de tal o cual palabra. También luego de la pausa Tim Westover nos preguntaba acerca de que nos gustaría hacer (podía ser actuar, armar un pequeño sketch, o escribir algo cómico, o imaginar una historia, etc., para que



"Las clases en NASK fueron muy amenas".



todo no sea muy pesado o muy académico. Hicimos cosas muy divertidas, como inflar globos y armar figuras.

Al finalizar la clase ya era tiempo de almorzar (desde las 12:00 a 13:30), ¡re puntual!, si llegabas al comedor a las 13:15 ya estaban cerrando el bufet y retirando la comida de las bandejas. Cada uno juntaba su plato, cubiertos y vasos y los depositaba en una cinta transportadora para ser lavados. Debías dejar la mesa que usaste despejada y limpia.

Luego cada uno usaba libremente su tiempo, para una siesta, conversar ó ir a la piscina. Pero atención, que no había que perderse la cena que era entre las 17:00 a 18:30. Agustina y yo tuvimos que adaptarnos a esos horarios sino nos quedábamos sin cenar. Imagínese que acá en casa a veces cenamos a las 22:00 o más y también es habitual almorzar a cualquier hora, a las 14:00 o a las 15:00 según nuestros improvisados horarios.

A la tarde luego de la cena (19:30), nos reuníamos en "LA GUFUJO". Era una reunión informal donde nos juntábamos y siempre ocurría algo interesante. Alguien mostraba fotos o hablaba de algún tema especial, se cantaba, alrededor de una mesa con tacitas para té o café, todo muy ameno, era un gran living con sofás y sillas y charla- Después cada uno se iba a su cuarto.

GUFUJO (gufúio) viene de gufo (búho en esperanto) y se podría traducir como "la cueva del búho". Debe ser por la actitud del ave de abrir bien los ojos y observar y escuchar, creo que fue ese el sentido de la palabra y era el nombre de la reunión después de la cena. Como si fuéramos vecinos de un edificio, nos reuníamos a la noche, algunos venían en pantuflas bien cómodos y solo escuchaban o participaban.

Siempre todo muy organizado, cuando nos íbamos a nuestro cuarto a dormir ya teníamos la hoja con la actividad del día siguiente, que alguien había pasado por debajo de la puerta cual correspondencia.

El último día en "La Gufujo", tuvimos la entrega de diplomas y la *Adiaŭa Festo*, (fiesta de despedida) y ese día mostré algunas fotos de Buenos Aires y de Argentina.

Mi deseo es que más argentinos puedan participar en NASK pues además de la capacitación y aprendizaje del idioma esperanto es una experiencia muy enriquecedora.

Mabel Ojeda
Beccar, Buenos Aires

Nuevo libro sobre el esperanto...


De Miguel Angel Rocha Gámez



El libro titulado "**Una nueva esperanza**", y subtitulado "la magia del esperanto" es un nuevo libro para difundir la existencia de la lengua internacional y sus características básicas, dando al lector una presentación sobre las ventajas de su uso y su facilidad de aprendizaje.

Es una obra de 105.000 palabras, 328 páginas y 14 capítulos, en hoja tamaño carta y con letras de tamaño y con espaciado que facilitan su lectura.

Es del género de ciencia ficción, el texto novelado se desarrolla en un ambiente multicultural. Está escrito en español, pero también aparecen frases y expresiones en más de veinte idiomas, además del esperanto, que son parte de los diálogos de los personajes. Elementos como el humor y el costumbrismo están presentes en el estilo de la obra, en donde también se encuentran temas como ecologismo, feminismo y nacionalismo en los diálogos de los personajes.



Un resumen de la obra es el siguiente: Esmeralda es una joven chilena residente en la ciudad de San Felipe. Al terminar el bachillerato, recibe de obsequio un viaje a Canadá. Desde antes de despegar el avión, los personajes empiezan a tener problemas de comunicación. Durante el trayecto, la aeronave desaparece y reaparece en un mundo paralelo, en otra dimensión, en donde los sobrevivientes del vuelo tras algunas peripecias se ven obligados a adaptarse gradualmente y a aprender el idioma que habla la mayoría de las personas en esa nueva sociedad.

Liderados por algunos de los sobrevivientes, entre ellos Esmeralda, los recién llegados entre los que hay personas que siempre se han expresado durante toda su vida en solo un idioma, se ven en la necesidad de aprender el idioma esperanto o lengua internacional, la cual fue llevada a ese lugar anteriormente por otros viajeros procedentes también desde la Tierra. Así, ellos van poco a poco descubriendo las bondades y ventajas de este idioma.

Una muestra de esta obra puede verse en:

https://docs.google.com/open?id=0B742c-Df1sslcmFzOE5ISlZNajA

http://internacia-lingvo.blogspot.com.ar/

Bonaero gastigos la 99-an Universalan Kongreson en 2014



Fontoj: Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro 456
Vikipedio: la libera enciklopedio

La Universala Kongreso

La 99-a Universala Kongreso de Esperanto de la jaro 2014 okazos en Bonaero (Argentino). La Estraro de UEA elektis la ĉefurbon el inter tri argentinaj urboj, kun kies organizaj kondiĉoj la Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães antaŭe konatiĝis surloke.

Argentino gastigos UK por la unua fojo, sed Esperanto havas tie jam longan tradicion. La lingvo estis enkondukita en la landon en 1889 fare de la pola rifuĝinto Polasky. La landa asocio de UEA, Argentina Esperanto-Ligo, estis fondita en 1941 kaj re-fondita en 1995. Ĉar unu el ĝiaj kunfondintoj estis Tibor Sekelj, estas bela koincido, ke la elekto de Argentino okazis ĝuste en la jubilea jaro de la 100-a datreveno de lia naskiĝo.

La lando de la UK

La Argentina Respubliko (hispane: República Argentina) estas ŝtato en Suda Ameriko, konstituciigita kiel federacio de 23 provincoj kaj aŭtonoma urbo, Bonaero. Ĝiaj najbaroj estas Ĉilio (sude kaj okcidente), Bolivio (norde), Paragvajo (norde kaj nordokcidente), Brazilo (nordokcidente) kaj Urugvajo (oriente). Ĝi ankaŭ havas longan marbordon de la Atlantika Oceano.

Politike ĝi estas federacia respubliko, kiu havas 23 provincojn kaj unu federacian distrikton. Nuntempe, Argentino estas ŝtato, kiu havas fortan ekonomikan evoluon. Post la severa ekonomika krizo de la jaro 2001, ĝia registaro kaj ekonomio renormaliĝis kaj nun la lando povas denove rigardi la estontecon kun espero. Laŭ sia indekso de homa disvolviĝo Argentino estas la dua plej avancinta lando de Sud-Ameriko. Aĉetpovo de la loĝantaro estas taksata kiel 23-a inter la ŝtatoj de la mondo.




Montaro: norda provinco Jujuy



Akvofaloj Iguazú, Misiones



Surakva vegetaĵo “Irupé”, rivero Paraná



San Carlos de Bariloche, Rio Negro



Glaćero “Perito Moreno”, Santa Cruz

La areo de Argentino estas 2.766.890 km², kaj situas inter la Andoj Montaro (okcidente) kaj la Atlantika Oceano (oriente). Ĝi estas la dua en la listo de plej grandaj landoj el Suda Ameriko, kaj la oka en la listo de plej grandaj landoj el la mondo.

Lingvo

Argentinanoj estas la plej granda en la mondo hispanlingva nacio, kiu tutece uzas voseon (voseo estas la uzo de pronomo “vos” anstataŭ “tú”). La plej populara dialekto estas Rioplatense. Alia lando, kie voseo estas amase uzata, estas Nikaragvo en Centra Ameriko.

Bonaero: la ĉefurbo

Bonaero (hispane [BŬEnos AJres], kiu signifas bonaj aeroj aŭ, se konsideri kuntekston de mara navigado, "la ĝusta vento") estas la ĉefurbo de Argentino. La oficiala urbo-regiono nomiĝas *Ciudad Autónoma de Buenos Aires* kaj enhavas ĉ. 3.000.000 da enloĝantoj. Sed la urbo kreskis multe en la apudan provincon, la Bonaera Provinco, kaj la tuta urba areo havas entute 12.700.000 enloĝantojn.

La loko, kie situas Bonaero, estis unue malkovrita fare de la hispana maristo Juan Díaz de Solís en la jaro 1516. Tamen la malkovro estis malfeliĉa por la maristo: li estis mortigita dum atako de indiĝenoj. Pedro de Mendoza fondis urbon unue en 1536 kaj Juan de Garay refondis ĝin en 1580.

Klimato

Bonaero havas humidan subtropikan klimaton. La averaĝa jara temperaturo estas 17.6 °C, kiu varias inter -5 / 43° C. Jare pluvas po 1147 mm (julie tre malofte neĝas).

E-Movado

Ekzistas Bonaera Esperanto-Asocio (BEA). UEA havas plurajn delegitojn, kaj Pasporta Servo listigas kelkajn esperantistojn, ĉe kiuj eblas senpage tranokti.

Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Argentina Esperanto-Ligo

Esperanto en Vietnam

El Congreso Mundial 2012

El 97° Congreso Mundial de Esperanto se desarrolló del 28 de julio al 04 de agosto de 2012 en Hanói, Vietnam, con 840 inscriptos de 62 países.

A pesar de no haber contado con una concurrencia numerosa como era habitual en años anteriores, se puede afirmar que el congreso fue todo un éxito.

En la apertura se presentaron danzas tradicionales y se contó con las salutaciones de las más altas personalidades locales e internacionales. **Probal Dasgupta**, Presidente de UEA presentó a los representantes de los diversos países. El saludo de bienvenida estuvo a cargo de **Nguyen Thi Doan,** Vice-presidenta de la República Socialista de Vietnam**.** Se leyó el mensaje de **Ludoviko Zalezki-Zamenhof**, nieto de Lázaro L. Zamenhof, iniciador el esperanto. Representando a nuestro país saludó **Silvia Rottenberg,** Presidenta de la Liga Argentina de Esperanto.

El programa se completó tal lo previsto con el desarrollo de conferencias, reunión de la Academia de Esperanto, cursos, veladas artísticas, servicio de librería, las sesiones del Comité de UEA y el acompañamiento de los esperantistas de distintos países.

Las fotos difundidas en *Fecebook* por algunos de los participantes, *-Long Zhang, Boris Kolker, Amri Wandel, Maarten Deprez, Ngo Thien y Francisco Veuthey-* muestran el gran colorido de este congreso. Cabe recordar que en el 2014 algo similar –y por qué no mejor- se desarrollará en Buenos Aires.-









http://www.facebook.com/media/set/?set=a.317581871671142.68197.100002579954703&type=1

*Vea más detalles en el Boletín "**Loa!:** Kongresaj kurieroj de la Hanoja UK"*

http://www.uea.org/kongresoj/uk_2012.html

Bonvenon
al la Universitato de Esperanto

Esperanto 125-jariĝo
1887 - 2012

Bonvenon al la retejo por la Universitato de Esperanto. Ĉi tie vi trovos la filmojn de la lecionoj jam instruitaj dum la sesioj de la Universitato de Esperanto. La unuaj universitataj kursoj okazis en januaro kaj februaro 2012 por celebri la 125-jaran datrevenon de Esperanto, kaj por kuncelebri la internacian jaron de Alan Turing.

Se vi estas studento, vi povas ĝui kaj studi kompletajn kursojn pri diversaj temoj en la internacia lingvo Esperanto. Nun estas du temoj. Unue, estas kurso kiu pritraktas militon. Ĝi nomiĝas Alfronti Militon, kaj estas instruata de profesoro Ron Glossop. Due, estas kurso de profesoro Federico Gobbo nomata Historio kaj Filozofio de la Informadiko.

Se vi estas profesoro, kaj jam instruis vian kurson nacilingve en la kadro de akreditita universitato, vi povas ankaŭ instrui ĝin en Esperanto. Ĉiuj lecionoj de la Universitato de Esperanto estas filmitaj, kaj poste metitaj sur la interreto, senpage, sub la licenco de Krea Komunumaĵo. Kontakti nin por pli da detaloj.

La unuaj du kursoj estis instruataj kaj filmitaj en la projekto Esperanto-Insulo, sur la insulo Hajnano de Ĉinio inter la 11-a de januaro kaj la 12-a de februaro 2012.

Kontakti nin por pli da detaloj:

<keefeinchina@gmail.com>
http://www.universitato.info/index.htm

ESPERANTO
125 jaroj

Nova E-interreta televido

La lanĉado de Globeto

http://fabinhomonteiro.com/2012/06/11/la-lancado-de-globeto/
http://www.youtube.com/playlist?list=PL6080927F401B564B

Pri Globeto

Mi kaptas ĉi tiun okazon por lanĉi mian unuan seriozan Esperantan aktivaĵon: “Globeto – interreta televido”. Ĝi temas pri rubriko ĉe mia “YouTube”-a paĝo, kie mi enmetas nur filmetojn en Esperanto aŭ pri Esperanto.

Globeto ne estas oficiala, movada, ŝtata aŭ ligita al ia specifa Esperanta entrepreno. Komence ĝi estas tre simpla projekto, tute sendependa kaj iom privata, ĉar ĝi estas farita de sola Esperantisto, kiu nur ŝatas raporti per filmoj.

Informoj pri TAKE 2011

Post preskaŭ unu jaro, finfine mi sukcesis munti kaj publikigi la filmetojn pri TAKE (la 8-a Tutamerika Kongreso de Esperanto). La prokrastado okazis pro manko de tempo por fari ian kroman laboron. Tamen mi nepre farendis tion, do mi kaptis mian tutan liberan tempon, inkluzive postnoktomeze kaj semajnfine, por realigi la du filmetojn.

Mi tro laboris dum la lastaj 4 semajnoj. Unue mi spektis ĉiujn filmetojn, kiujn mi filmis dum la kongreso, proksimume 300 etaj filmoj. Poste mi priskribis ĉiujn sur la papero por plifaciligi la laboron. Due mi skribis gvidilon, rakontante ĉiujn kiuj aperus ĉe la ekrano. Trie mi registris mian paroladon, elektis kelkajn uzotajn muzikaĵojn, son-efektojn, vinjetojn ktp. Poste la plej amuziga sed laciga parto: la muntado, kie mi devus aranĝi ĉiujn bildojn kaj sonojn laŭ la gvidilo…

La sekvaj paŝoj

Se vi jam spektis la filmetojn pri TAKE, vi certe perceptis ke bedaŭrinde la kvalito de la bildoj ne estas tiel bona. Ili estas nur videblaj, sed tre malbonaj, ĉar ili estis faritaj per ege simpla fotilo (vidu dekstre). Pro tio, mia celo nun estas aĉeti plibonan kameraon por plibonigi la kvaliton de Globeto, kaj fari la bildojn pliagrablaj al la spektantoj.



Mi intencas fari tion en la venonta monato. Tuj poste mi faros novajn filmojn. Mi jam havas kelkajn ideojn kaj bonajn historiojn por rakonti… Pri tio, tuj mi blogos ĉi tie.

Kiel kaj kial fari E-filmetojn?

Nuntempe esprimi sin per filmoj fariĝis tre facila. Ankaŭ fariĝis facila publikigi kaj dissendi filmojn mondskale. Por fari tion, vi ne bezonas esti profesia ĵurnalisto, filmisto aŭ reĝisoro. Vi bezonas nur ian fotilon aŭ filmilon kaj ian komputilon, krom la volo, la vervo, kaj la instigo esprimi sin per filmoj.

La teknikaĵoj por esti filmanto fariĝis iom malmultekosta kaj tre havebla en plejmulto da landoj. Krome ne estas mistero kiel manipuli filmilojn aŭ fotilojn. Tiaj maŝinoj ĝenerale funkcias kiel infanaj kaj amuzigaj ludiloj. Probable la problemo estus la muntado, ĉar la softvaroj por fari tian laboron eble ne estas tiom popularaj inter nefakuloj. Tamen jam estas kelkaj programaroj, kiuj estas tre haveblaj, facile uzeblaj, mal-multekostaj aŭ eĉ liberaj, kaj ili kapablas realigi muntadojn kvazaŭ profesinivelo. Mi ekzemple uzas softvaron, kiu nomiĝas “Sony Vegas” kaj ĝin mi rekomendas al la komencantoj.

Do faru ni E-filmetojn! Estas facile kaj krome tre utile! Nun mi memoras ke antaŭ 4 jaroj, kiam mi malkovris Esperanton, mi unue serĉis ion ĉe “Youtube”, sed preskaŭ nenio aperis… Tamen nuntempe jam estas pli da E-filmetoj interrete, sed la kvanto ankoraŭ ne sufiĉas. Mi opinias ke la aŭdvidaj produktaĵoj estas nepraj aferoj por Esperanto. Ĝi ebligas ege interesan kulturan interŝanĝon. Ĝi multe helpas la lernadon kaj la disvastigadon de la lingvo. Kaj ĝi povas montri plifacile al neesperantistoj ke nia internacia lingvo estas viva, disa en la tuta mondo kaj estas tre utila. Do antaŭen!

Per ĉi tiuj unuaj filmetoj mi esperas ke la homoj, kiuj partoprenis en TAKE, sopiros pri tiuj neforgeseblaj tagoj en San-Paŭlo. Kaj tiuj, kiuj ne partoprenis, fariĝos instigataj por partropeni ĉe la venontaj Esperantaj aranĝoj. Mi ankaŭ volas ege danki al ĉiuj, kiuj estis intervjuitaj; kaj al ĉiuj geamikoj, kiuj helpis iamaniere. Ha, se vi volas komenti aŭ lasi ian opiniojn, bonvole ne hezitu! Skribu sube. Tamen estas grave lasi komentojn ĉe la propra “YouTube”-a paĝo, ĉar tie pli da ordinaraj homoj povos konstati ke Esperanto vere ekzistas.

Fábio Monteiro

Pupekzpozicio

De la 29-a de septembro ĝis la 8-a de oktobro okazos en Higashikagawa, (insulo Ŝikoku, Japanio), la 2-a Monda Pupekspozicio. Tiam estos eksponataj ĉ. 800 pupoj el 39 landoj el Afriko, Azio, Mezeŭropo kaj Sudameriko.

Kiel jam tradicie, la pupoj estos prezentataj en laŭlandaj standoj kun tre riĉaj informoj pri historio, rilatoj inter Japanio kaj la landoj de la pupoj, pupistoj, mapoj, puplibroj, ekzotikaj bongustaĵoj kaj ilia landa muziko.

La nuna kolekto estas riĉigita per pupoj el



Albanio, Ĉinio, Honduraso, Kubo, Mongolio, kaj aliaj, venintaj danke al la kontribuo de esperantistoj.

Higashikagawa estas konata kiel Pupurbo. Ĝi kalkulas je prestiĝa pupteatrejo kaj ĉiujare en marto kaj oktobro okazigas pupfestivalojn. Tiu de marto estas Hinamatsuri, kiam ĉ. cent loĝejoj montras tradiciajn japanajn pupojn en iliaj fenestroj.

Por subteni la agadon de la Nova Turisma Asocio kaj tiel instigi ilin plu realigi tiaspecan kulturan agadon, ebligantan kontribui al la komuna interkompreniĝo inter landoj, mi petas de la Esperantistaro sendi poŝtkarton pri pupoj en tradiciaj vestaĵoj al la jena adreso:

Nova Turisma Asocio
2163 Hiketa
JP-769-2901 Higashikagawa-shi
Japanio

Ankaŭ la kartoj estos ekspoziciataj en la sidejo de nia Asocio. Antaŭdankon pro via kontribuo. Landoj reprezentataj: Albanio, Argentino, Armenio, Benino, Barato, Bolivio, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥio, Ĉilio, Ĉinio, Ebura Bordo, Ganao, Honduraso, Hungario, Indonezio, Japanio, Kamerunio, Kazaĥstano, Kroatio, Kubo, Latvio, Laoso, Litovio, Meksiko, Nepalo, Mianmaro, Mongolio, Pollando, Rumanio, Senegalio, Slovakio, Slovenio, Suda Koreio, Togolando, Turkio, Ukrainio, Urugvajo, Uzbekistano.


Raportas: Etsuo Miyoshi, prezidanto de la Nova Turisma Asocio de Higashikagawa.-

Aŭtomobilismo

Vivo de la sportpiloto Ayrton Senna: vera moderna heroo

Buenos Aires: Maximiliano Catania; www.funof1.com.ar (*)

Ayrton Senna da Silva naskiĝis la 21-an de marto 1960 en San-Paŭlo (Brazilo). Li estas taksata kiel unu el la plej bonaj konkursopilotoj de ĉiu epoko, pasigis sian tutan vivon en la motorsporto kaj konkeris la amon de siaj zelotoj kaj la respekton fare de la kritikistoj de Formulo-1. Piloto dotita per talento, kiu permesis al li esti ĉie la plej bona. Lia ĉarmo kaj juna rideto igis lin vera moderna heroo... La historio de Ayrton kun l' aŭtomobiloj portas nin al lia infanaĝo, kiam lia patro – riĉa aferisto kaj bienulo – kreis etan go-karton por li. Tiam la moveblecproblemoj ŝajnis malaperi tiel, ke li povis eniri la motor-sportomondon. Per la helpo de sia patro, li partoprenis en la konkursoj de la brazila ĉampionado de go-kartoj en 1973, kaj li ne multe malfruis por pruvi siajn stirkapablojn: li obtenis sian ĉiaman venkon la 1-an de julio en Interlagos. Estante go-karta ĉampiono de Sudameriko kaj monda vicĉampiono en 1980, Senna iris de Brazilo al Eŭropo, kie la plej gravaj Formuloj rezervis lokon por li. Ayrton, dank' al la helpo de sia patro, obtenis interkonsenton por stiri Van Diemen-on de la British FFord 1600 (1981). Li iĝis ĉampiono jam en la inaŭgura periodo. Poste li estis ĉampiono de la FFord 2000 kaj brita kaj eŭropa obtenante startopoziciojn, venkojn kaj rapidajn rondojn per mirinda facileco. La venonta paŝo estis tiu de la Brita Formulo 3 (1983); estis ekscitaj dueloj kun Martin Brundle, kaj Senna portis sian Ralt-Toyota-n al alia ĉampio-nadvenko. Post lia venko en la F3-a GP de Makao, Frank Williams petis al Senna testi F1-an aŭton. Li poste testis aliajn ŭtojn kiel McLaren-on kaj Brabham-on, sed lia eniro en



F1-on (1984) okazis kun la humila teamo Toleman.

La kurejo de Rio Jacarepaguá, en lia brazila hejmo, estis la loko de la unua F1-a kuro de Senna. Ĝi ne estis bona komenco. Li startis el la lastaj vicoj, kaj havis fruan retiriĝon pro pro-blemoj de la turbina motoro Hart. Tamen li ne kapitulacis. Post unu paro da semajnoj, en Sud-Afriko, li havis similan performancon en la kvalifikoj, sed li gajnis sian unuan poenton lokante sian 19-nombran Toleman-on en sesan pozicion. Meze de la ĉampionado li obtenis sian unuan podion (duapozicie) en la pluva Monako kune kun Alain Prost (unuapozicie). Tiu kuro estis diskutota por esti stopita tre frue. Estante naŭa fine de la ĉampionado, Ayrton estis varbita de la teamo Lotus por stiri kun la italo Elio de Angelis.

Ayrton, en sia dua GP por la brita teamo, obtenis sian unuan ĉiaman F1-an venkon en la pluva Estoril (Portugalio), kun unuminuta ekarto super Michele Alboreto. La brazila piloto refariĝis venkanto en la Belgia GP, fermante la periodon kun du venkoj kaj sep startopozicioj.

La venontan jaron, la motorsportaj kritikistoj jam konsideris Senna-n kiel unu el la plej bonaj tiutempaj pilotoj, kune kun Alain Prost, Nelson Piquet kaj Nigel Mansell. Lia spirhaltiga venko en Hispanio kontraŭ Mansell estis pruvonta, ke la enmeto de Senna inter la kvar plej bonajn ne estis tutsimpla hazardaĵo.


En 1987, la teamo Lotus ekkuris per la motoroj Honda (en 1985 kaj 1986 la motoroj estis de Renault) kaj Ayrton obtenis la unuan el siaj ses venkoj en Montekarlo; li eŭforie salutis la meĥanikistojn kaj poste sur la podio trempis la Reĝan Familion per ĉampano. Je la fino de la periodo, Ron Dennis anoncis, ke Senna estas



konfidita de McLaren por kuri kun Alain Prost por la jaro 1988.

Dum la periodo, la alianco McLaren-Honda estis miriga: 15 venkoj el 16 kuroj. Ĝi estis la jaro de la unua ĉampionadvenko por Senna, dank' al liaj 8 venkoj kontraŭ la 7 de Prost, kvankam la lastulo obtenis pli da ĉampionadaj poentoj. Tamen la periodo 1988 ne estis nur la plej bona jaro de la historio por McLaren, sed ankaŭ la komenco de unu el la plej fascinaj rivalecoj de la tuta F1-a historio.

Pruvo de tio estis, en 1989, la malobservo de supozita pakto inter Senna kaj Prost por ke ili ne preterpasu unu la alian en la GP de San-Marino. Oni diris, ke tio estis la komenco de tia rivaleco. La venonta etapo estis estonta la GP de Japanio en Suzuka, kie la kontrasto atingis nesuspekteblajn nivelojn. La franca piloto estis preter ĉiuj kaj postkurata de la brazilano kun malmulte da rondoj farendaj, kiam Senna klopodis preterpasi lin en la kurbiĝo, kiu estas antaŭ la ĉefa rektaĵo, sed ambaŭ aŭtoj koliziis kaj konsekvence de tio ili retiriĝis el la kuro. Kvankam Ayrton sukcesis refunkciigi sian aŭton (dank' al la kurejoteknikistoj) kaj fakte venki la Grandan Premion, li estis poste elkonkursigita, do la ĉampionadvenko iris al Prost. "Mi estas prišTelita" diris Ayrton. La prezidanto de FISA, Jean-Marie Balestre, trudis monpunon al Senna pro tiuj deklaroj kaj aldone lia F1-a stirlicenco estis provizore nuligata.



Ayrton Senna reobtenis sian licencon pagante milionan monpunon kaj pardonpetante al la estroj de FISA. Estis 1990 kaj Alain Prost iris en Ferrari-n, dirante, ke lia malproksimiĝo okazis pro tio, ke McLaren favoris la brazilan piloton. La destino volis, ke la ĉampionado estu debatata denove inter ili kaj, post unu plia kolizio en Japanio, Senna venkis la ĉampionadon je la dua fojo.

La venonta jaro estis estonta tiu de la tria ĉampionadvenko por Senna. Nigel Mansell de Williams malsukcesis denove venki la ĉampionadon. La brazila piloto komencis la jaron per kvar sinsekvaj venkoj en Usono, Brazilo, San-Marino kaj Monako, dum Briton restabiliĝis meze de la periodo. Elvojaĵo de tiu lasta en la japana GP riveliĝis avantaĝa por la piloto de McLaren. Senna oferis venkon al la brazila torcida en la pluva Interlagos, sian unuan venkon post 7 malsukcesintaj provoj.

Ayrton eniris en la liston pri la trifojaj ĉampionadvenkintoj: Brabham, Stewart, Lauda, Piquet, Prost... La aferoj ŝanĝiĝis en 1992, dank' al la grandioza laboro de la teamo de Frank Williams, do Mansell venkis sian unuuran F1-an ĉampionadon, venkante 9 el la 16 tiujaraj kuroj. La veturo de Ayrton Senna ne estis konkurenca, sed li obtenis tri merititajn venkojn: Monako, Hungario kaj Italio. La unua el ili, en la princolando, estis obtenita dank' al gumaj problemoj en l' aŭto de Mansell kun dek rondoj ĝis la fino... Sen la motoroj Honda, kaj plenaj je internaj problemoj,

McLaren devis uzi la motorojn Ford por la periodo 1993. Prost revenis en la kategorion post unu sabata jaro, nun stirante por Williams. Senna, malgraŭ kelkaj antaŭvidoj, estis estonta honesta rivalo por la franca piloto kaj memoro de eksaj bataloj estis la rezulto de tio ĉi. Malgraŭ ĉio, la ĉampionado estis venkita de Prost. Senna venkis 5 kurojn kaj la piloto de Williams 7. Du rimarkendaj venkoj de Ayrton estis tiu en Donington (GP de Eŭropo) pro la eminenteco de liaj stirkapabloj, kaj la alia en Interlagos (Brazilo), kie li estis eŭforie salutata de Juan Manuel Fangio sur la podio (la kvinfoja argentina piloto taksis la brazilanon kiel sian postveninton). Senna adiaŭis McLaren-on per venko – la lasta de sia kariero – en Adelajdo (Aŭstralio). Frank Williams dungis Senna-n por stiri unu el siaj aŭtoj por la jaro 1994, kune kun Damon Hill.

"La plej bona piloto kun la plej bona aŭto ne povas obteni alian rezulton ol la ĉampionadon mem" oni diris. Tamen, la jaro komenciĝis kun malfacilaĵoj por Ayrton kun du startopozicioj kaj du retiriĝoj en Brazilo kaj Pacifiko, dume lia defianto, Michael Schumacher de Benetton venkis ambaŭ konkursojn. La venonta epizodo, fina epizodo, estis okazonta en San-Marino. La aferoj estis malsimplaj jam ekde la komenco pro la grandioza akcidento de Rubens Barrichello dum la vendredaj sesioj, kaj do pro la morto de Roland Ratzenberger je sabato. Senna, videble maltrankvila, havis malbonan antaŭsenton, sed li eniris en la kuron egale. Li startis el la unua startopozicio, kaj okazis en la sepa rondo en la kurbiĝo Tamburello, ke li adiaŭis nin.

Multe da aferoj oni diris ekde tiu 1-a de majo. Brazilo ploris sian idolon. Eĉ Alain Prost estis vere malgaja.


Ayrton Senna obtenis 41 venkojn, 65 startopoziciojn (rekordo) kaj 19 rapidajn rondojn dum sia F1-a kariero. Sed nuraj statistikoj ne kreas idolon. La rilato inter li kaj lia publiko iris trans ĉiu unuopa partoprenado en iu ajn Granda Premio. La brazilano havis senliman talenton ene de la kurejo kaj kapablon interrilati kun aliaj personoj ekstere de ĝi.

Enketo farita en Brazilo (2000) malkovris, ke Senna estas rigardata esti la plej granda heroo de sia lando. Unu plia pruvo por diri, ke Ayrton estas vera moderna heroo.

Fotoj: Internet

(*)Materialo tradukita de Alessandro Fiorillo

Forpaso



Enio Hugo Garrote, (1928-18/07/2012) elstara argentina esperantisto, naskiĝis en Rafaela, provinco Santa Fe, kaj esperantiĝis en la jaro 1946, ĉe loka Esperanto-rondo kaj per kursoj de AEL.

Post edziĝo translokiĝis al Kordobourbo, kie partoprenis en KEA, *Kordoba Esperanto-Asocio,* ĉefe kiel instruisto kaj sekretario, kaj kiel aktiva membro de AEL-Argentina Esperanto-Ligo.

Profesie li laboris kiel libera libro-vendisto.

Ekde la jaroj 1950 komencis verki en esperantaj revuoj kiel redaktoro, tradukisto, eseisto, ĉefe en "Sennacieca Revuo" kaj "Laŭte", krom "Argentina Esperantisto" kaj KEA-bulteno "Antaŭen".

En 1958 ricevis la taskon traduki Esperanten la konatan verkon de Tibor Sekelj "Tempestad sobre el Aconcagua" eldonita en 1959 en Eŭropo. Poste kunlaboris kun la "Argentina Esperanto-Instituto", kie eldonis "La Triviala Homo" de José Ingenieros, en 1976; "Antologio de Argentinaj Noveloj" (1972) "Argentina Poemaro" (1978), la du lastaj en kunlaborado, sub la pseŭdonomo "Bastono de kordobo"; "Argentina Novelaro" (vol. I, II, III; 1978, 1980, 1982). Kaj sub la pseŭdonomo "Magistro Eŭgo" kvar volumetoj de "Kordobaj akvafortoj", eldonitaj de SAT-broŝurservo. Restis en Arkivoj de la Asocio, multaj aliaj tradukoj kaj eseetoj pri/de Borges kaj aliaj argentinaj verkistoj, kaj sia "Manlibro pri Esperanto", kiu estis rezulto de propra eksperteco kiel instruisto de la internacia lingvo. Niaj kondolencoj al la familio.

Brazilo

La 48-a Brazila Kongreso de Esperanto

La venonta **Brazila Kongreso de Esperanto** okazos en ***Barra do Garças***, MT, en la centra-okcidenta regiono de la lando, inter la 18-a kaj 22-a de januaro 2013.

Laŭ informo de Brazila Esperanto-Ligo (BEL) samtempe realiĝos 3 gravaj kongresoj:

http://esperanto.org.br/bel/brasil-mainmenu-89/48bke.html

48-a Brazila Kongreso de Esperanto - BKE
33-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso - BEJK
11-a Brazila Infana Kongreso de Esperanto

La urbo *Barra do Garças* situas en tre grava regiono de Brazilo. Pri ĝi aperis videon **"Aragvaja EKO-KRIO".** La video, originale verkita en Esperanto, gajnis la unuan premion en Belarta Konkurso de UEA, en Tampereo, Finnlando, julio 1995. Ĝi rakontas pri la aragvaja regiona historio, la indiĝenaj unuaj loĝantoj, ekologiaj kaj turismaj monumentoj de Aragvaja baseno, kun negativaj homaj influoj kaj eblaj solvoj far de la Gardantoj de la Naturo, ene de la Brazila Geodezia Centro. Ĝi estis produktita de Societo Gardantoj de la Tero, BEL kaj TV Araguaia-SBT, -Barra do Garças, Mato Grosso. Reĝisorita de Ciro Gomes de Freitas - Skipo: Amarílio Carvalho, Wagner Ribeiro, Clevton Donini kaj aliaj. Entuta tempodaŭro: 30 min. En Youtube ĝi estas dividita en tri partoj.

http://www.youtube.com/watch?v=dQkKTwKKp9U&feature=youtu.be
http://www.youtube.com/watch?v=cbjjD0XhSaw&feature=youtu.be
http://www.youtube.com/watch?v=48VnMatS-4&feature=youtu.be

Krome, la himno de urbo *Barra do Garças* (MT) Brazilo, nomata "Mi Amas Barra", aperas en la videa dokumento Esperanto-video Aragvaja Eko-Krio kiu gajnis la unuan premion en Belarta Konkurso de UEA, en Tampereo, Finnlando, julio 1995. Tiu ĉi muzika video estis reeldonita en majo 2012 kun diversaj aliaj novaj bildoj. La himno estis farita de Eudes Roberto el Aragarças (GO). Ĝi estis eldonita de Societo Gardantoj de la Tero. Reĝisorita de Ciro Gomes de Freitas. Bildoj de Ciro Gomes, Genito Santos kaj Luzemar Pereira.





www.youtube.com/watch?v=jvL17ifFnQY

Esperanto en NU

UEA en UN-kunsido pri indiĝenaj popoloj

Inter la 9-a kaj 13-a de julio okazis ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo la 5-a sesio de la fakula kunsido traktanta la tutmondan situacion koncerne rajtojn de indiĝenoj, "Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP)". Reprezentantoj de UEA Verena Graf, Cesco Reale kaj Stefano Keller partoprenis la eventon, kiun ĉeestis delegitoj de indiĝenaj popoloj el ĉiu kontinento kaj membroj de NRO-oj defendantaj indiĝenojn. La rezultoj de la EMRIP-kunsido, kiu okazas unufoje ĉiujare, estos plutraktataj de la Homrajta Konsilio de UN.

La tutsemajna sesio, kun la ĉefa temo "Lingvoj kaj kulturoj", estis por la teamo de UEA bona okazo por krei plurajn novajn kontaktojn, ĉar praktike en ĉiu interveno estis menciita la lingva situacio de la popolo de la alparolanto. Tio ebligis alparoli la intervenintojn rekte pri la temoj de UEA: lingvaj rajtoj kaj la uzo de neŭtrala internacia komunikilo.

Stefano Keller, estrarano de UEA kaj ĉefreprezentanto en Ĝenevo, alparolis la kunsidon. Li substrekis la malavantaĝan situacion de indiĝenaj popoloj interalie el lingva vidpunkto kaj atentigis pri sciencaj studoj koncerne la neceson povi uzi sian gepatran lingvon, citante starpunkton de lingvistoj k.a. fakuloj, kaj deklaraciojn kaj konvenciojn de Unesko.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 461

Libro

"Un Policía, Una Vida,
Una Historia.
Los Relatos Del Sargento Oviedo".
Autor: Alejandro Pedro Ojeda

La presentación del libro se realizó el viernes 06 de julio a las 20:15hs en el Salón “Edgardo Rossi” del Centro Cultural de la Universidad Nacional del Nordeste, en la ciudad de Resistencia, Chaco.

¡Nuestras felicitaciones a Pedro!

